TEJO-aktuale: numero 489, 2023-11

n°489 | Novembro 2023

**Karaj abonantoj, bonvenon!** Jen via monata raporto pri projektoj, eventoj, kaj iniciatoj de junaj esperantistoj el ĉiuj kontinentoj. En Novembro, ni fieras pri niaj aktivuloj kiuj partoprenis eventojn, kunvenojn, projektojn... por disvolvi la ideojn de Esperanto ĉie en la mondo. 2023 baldaŭ finiĝos, kaj estas do tempo reflekti pri niaj atingoj, celoj, kaj la vojo, kiun ni kune trairis dum la lastaj monatoj. Kial ne kundividi tiujn pensojn kun la mondo? Partoprenu en nia filmeto por la Zamenhofa Tago kaj sciigu la komunumon! **Atendante viajn kontribuojn, havu bonan legadon, kaj ĝis la venonta!**

---

Ĉi-jare, TEJO denove pretigos filmeton kiu montros la diversecon kaj belecon de nia movado, kaj ni bezonas vian helpon! La temo estas **"Kio estas lingva identeco por vi?"**. Ĉu vi volas kundividi viajn spertojn kaj sentoj pri la temo, aŭ ĉu vi simple emas disvastigi vian ĝojon pri Esperanto? Sendu filmeton ĝis la 8-a de Decembro.

---

Ĉu vi deziras kunlabori por krei memorindan sperton por la junularo tutmonde? **Ni serĉas homojn por aliĝi al la organiza teamo de IJK 2024** kaj helpi organizi nekredeblan kongreson por ĉiuj partoprenantoj. Aliĝu tuj kaj antaŭĝoju!

***Kontakto* 313 (2023:2) haveblas!** Ĝi enhavas kiel kutime multajn interesajn artikolojn pri multaj interesaj temoj... eksciu pli elŝutante la PDF-dosieron. Ĝuu la legadon!

La **Interkutura Novelo-Konkurso** estas jam en sia kvara eldono kaj invitas vin verki novelojn kun la temo "**Artefaritaj intelektoj, pensantaj maŝinoj kaj *Homo sapiens*"** kaj sendi ilin per la reta formularo antaŭ la 30-a de Junio 2024. Legu pli pri la konkurso.

# Lastatempaj agadoj

**TEJO reprezentantoj partoprenis la Konsilion de membroj de FoJE!** Dum intensa semajnfino en Berlino, reprezentantoj de internaciaj junularaj organizoj kaj naciaj junularkonsilioj kunvenis por diskuti kaj la estontecon kaj agadperspektivojn de FoJE, celante la plibonigadon kaj defendadon de la rajtoj kaj necesoj kiuj koncernas la

Eŭropan junularon.

**La Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ) estas nun plenrajta membro de la Nacia Junulara Konsilio de Katalunio (CNJC).** La landa sekcio do integriĝas en la plej grava junulara organizaĵo de Katalunio: gratulojn al KEJ pro tiu atingo!

**La studsesio "Junularaj Perspektivoj", organizita de TEJO kaj kunlabore kun Konsilio de Eŭropo** permesis al partoprenantoj lerni, kaj kunhavigi spertojn pri la valoro kaj defioj de neperforta kaj interkultura komunikado, por povi aktive kontribui al la evoluo de interkulturaj socioj.

# Videoj

En Junio 2023 delegitaro de TEJO-anoj partoprenis en la Eŭropa Junulara Okazaĵo (EJO), eventego organizita de la Eŭropa Parlamento. Spektu la duan plurlingvan filmeton, kie ni parolas pri unu el niaj aktivaĵoj (la ateliero "X-lingvo") al la trejnistoj kaj trejnatoj. Subtitoloj haveblas en pluraj lingvoj!

*Petveturaj Aventuroj* daŭrigas la rakonton de Judit, sekva TEJO-volontulo, kiu aperis en *June kaj Kune*. La muzikalo originale verkita en Esperanto estis prezentita al publiko dum la Internacia Junulara Kongreso 2023 kaj ĝi nun spekteblas rete!

# Venontaj eventoj

La Komuna Seminario estas junulara evento, kiu estas unu el la plej granda junulara Esperanto-renkontiĝo de la jaro en Azio. Ĉi-jare, ĝi revenos al **Vjetnamio** kaj estos okazigota en **Hanojo** kaj **Ninh Binh de la 15-a ĝis la 18-a de Decembro** kun la ĉeftemo *"La influoj de la rapida evoluo de teknologio sur nia vivo".*

La interesgrupo de Adoleska Agado de TEJO entuziasme invitas vin partopreni sian retan eventon: **ARTo (Adoleskantara Reta Tago)** estas organizita de adoleskuloj por adoleskuloj, kaj okazos la **24-an de Decembro**. Pliaj detaloj venos poste, sed intertempe, ne hezitu proponi programeron por kune amuziĝi!

**JES, la Junulara E-Semajno okazos en Storkow (Germanio) de la 27-a de Decembro ĝis la 3-a de Januaro.** Kiel kutime, la teamo antaŭvidas riĉan kaj buntan programon (koncertoj, ekskursoj, Esperanto-kursoj kaj multe pli)! Eksciu pli pri kio okazos dum JES kaj aliĝu!

KEJ anoncis sian venontan junularan vintran aranĝon, la **RenKEJtiĝo**! Ĝi okazos **inter la 23-a kaj la 25-a de**

**Februaro 2024**, en **L'Espluga de Francolí** (suda Katalunio). Amika etoso kaj memorindaj spertoj certe atendas vin tie: aliĝu!

Ĉu vi pretas por duobla poliglotumado? La Plurlingvula Kunveno (*Polyglot Gathering*) denove okazos en 2024. La reta evento okazos de la **29-a de Februaro ĝis 3-a de Marto**, kaj la ĉeesta parto okazos en **Prago (Ĉeĥio) de la 15-a ĝis 19-a de Majo**. Vizitu la retejon por ricevi pli da informoj kaj aliĝi.

IEJ atendas vian partoprenon en la **47-a Internacia Junulara Festivalo** en **Serrada di Folgaria (Italio)** de la **27-a de Marto ĝis la 2-a de Aprilo**! Aliĝu plenigante la formularon.

**Strasburgo (Francio)** bonvenigas vin por interasocia **Eŭropa Esperanto-Kongreso** de la **8-a ĝis la 12-a de Majo 2024**. Bunta kultura kaj kleriga programo estas jam preparata kun pluraj eŭropaj landoj kiuj iĝis partneroj de la evento. Jam eblas aliĝi!

Notu la datojn: la Internacia Junulara Kongreso 2024 okazos en **Šventoji (Litovio) inter la 18-a kaj 25-a de Aŭgusto 2024**. Pretiĝu por neforgesebla semajno apud la maro kaj belega naturo!

Trovu pli da eventoj sur la retejo eventaservo.org.

**Por pli da TEJO eventoj, alklaku la bildon!**

---

**Iĝu parto de nia tutmonda komunumo!**
**MEMBRIĜU EN TEJO!**

Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj, kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

---

**Ĉu vi volas kontribui sendante interasajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO Aktuale?** Sendu viajn novaĵojn al info@tejo.org antaŭ la 23-a tago de la monato. Antaŭdankon pro la helpo!

## K o l o f o n o

***TEJO Aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas 1 foje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** Jeanne Grimaud
**Kontribuantoj de ĉi tiu numero:** Maria Tsagari, Salvatore Iozzo

**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2023 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn?
Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni vin de ĉi retpoŝta bulteno.

This email was sent to capiscuas@gmail.com
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands